*Fino de la paĝo 18*



Hveragerdi. Tuboj kun varma akvo sendata por hejti Rejkjavikon.

Varma akvo ebligas facile kaj malmultekoste produkti multe da elektro. Ĉu tro ? Ĉar ankaŭ estas hidroelektro kun barajoj ĉe riveroj. Tio instigis firmaojn uzi ĝin por produkti aluminion el erco importita per ŝipoj de Novzelando ... kaj tio poluas !

Pli interese estas uzi tiun varman akvon por kultivi legomojn, fruktojn – eĉ bananojn ! - en forcejoj aŭ studi la vivantajn estaĵojn, kiuj vivas en sia propra natura medio, kiu estas simila al tiu, kiam vivo aperis surtere ; estas algoj, DNA, enzimoj ... kaj en malsamaj pH kaj temperaturoj . . .

Ĉio tio estis videbla dum la postkongresa ekskurso de Akureyri ĝis Rejkjaviko, kiu montris la diversajn aspektojn de Islando. La kunmetita mapo montras kie estas Akureyri, kaj la ekskurso, kiu, dum tri tagoj veturigis nin ĉirkaŭ tiu urbo : lagoj - inter kiuj kelkaj ebligas bani sin -, akvofaloj, limo inter la du tektonplatoj kaj la fiŝista urbeto Siglufjördur kun ĝia muzeo de la Haringa Erao kaj aliaj...



Birdoj (fraterkuloj kaj mevoj en Stykkisholmur [okcidenta parto de Islando]



Moluskoj. Ili devenas de fiŝkaptita reto de la ŝipo, kiun oni uzis por vidi balenojn kaj ŝarkojn.

La reveno al Rejkjaviko okazis laŭ la plej mallonga vojo - en punktolinio sur la mapo – preter la altebenaĵo Kjölur inter la glaciejoj Langsjökull kaj Hofsjökull, tra la urbeto Hveravellir – regiono kun multaj varmakvaj fontoj. Kaj de tiu urbeto ĝis Rejkjaviko la vojo ĉiam estis inter la du tektonplatoj kun akvofaloj, gejseroj, kaj la plej malnova monda Parlamento AlÞing de la jaro 930, kiu situas apud Þingvellir, en la naturo mem. Alia historia loko estas en Rejkjaviko : estas la domo Höfdi, kie en 1986 renkontiĝis GORBAĈEV kaj CLINTON por la fino de la Malvarma Milito - ĉu la varmo de la subgrundo influis ? Kaj ankaŭ estas fama statuo de la Vikingo Leif ERIKSSON nomata la Bonŝanculo kaj filo de Erik la Ruĝulo, kiu ŝipiris ĝis Gronlando kaj Ameriko en la jaro 1000.





Malnovaj domoj en la kamparo, per ligno kaj tero.

Sen paroli pri la botanika ĝardeno en Akureyri mem, nek pri la salmoj en pura akvo de riveroj, nek pri la simpatiaj islandaj ĉevaloj – oni eĉ ricevis diplomon de rajdanto post promenado sur padoj en la kamparo dum pli ol du horoj, sen fali do sen vundito ! – nek pri la manĝaĵoj – oni eĉ frandis kokinovojn kuiritajn en truo kun bolanta akvo de fonto ! - nek de la historio, kulturo, muzeoj de tiu « freŝdata » lando, - laŭ la aĝo de Tero... !



Ovo en reto kuiras en bolanta akvo de fonto.

Kaj sen forgesi Harpa, la Kongresejon ! Sed multe(*) jam estis dirita pri tio.

Jean LABARRE. (teksto kaj fotoj)

(*) : *Fakte multaj revuoj en Esperanto raportis pri tiu 98ᵉ Universala Esperanto-Kongreso en Rejkjaviko ! (ndlr !)*